IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 38 - trimonata
08/2

Redakta komitato:
Jozefo Németh (red.)
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Peter Balaz
Joelle Conroy
Palma Csiszar-Salomon
Aleksandr Griscenko
Dennis Keefe
Zsofia Korody
Ilona Koutny
Raita Pyhala
Sean O Riain
Bardhyl Selimi
Ladislao Szöke
Wei Yubin
Krtystyna Worobiej



ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: *Enkonduke* 3
Ilona KOUTNY: *Dekjariĝo de la Interlingvistikaj Studoj en UAM* 4
Dennis KEEFE: *Kiel starigi kaj organizi LF en via urbo? (parto I.)* 7
Seán Ó RIAIN: *La defio de la politiko de plurlingveco […]* 15
RAITA PYHÄLÄ: *Lerneja malbonfarto* 21
BARDHYL SELIMI: *Dialektiko en matematiko* 23
El landoj kaj sekcioj (AR, BE, BG, CN, DE, HU, PL, SE, VE) 27
Por via notlibro (Peter BALÁŽ, Zsófia KÓRÓDY) 34
Forumo (Aleksandr GRIŜĈENKO) 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica PETROVIĆ, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Vicprezidanto: Zsófia KÓRÓDY, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983, <zsofia.korody@esperanto.de>.* Instrukapabligado kaj edukaj centroj.

Sekretario: Atilio ORELLANA ROJAS, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <atilioorellanarojas@gmail.com>.*

Estrarano pri financoj: Sjoerd BOSGA, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Vicsekretario: Mihai TRIFOI, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio. Tel.(+40)267-365319, <trifoi@honoris.ro>.* Lerneja agado.

Estrarano: Aida ČIŽIKAITĖ, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>.* Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Yas KAWAMURA, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio. <esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

La nunan numeron ni sendis al la presejo 29 aprilo 2008, redaktofino por la sekva numero 31 aŭgusto 2008.

Titolpaĝe: *D-ro Iván BUJDOSÓ kun la ĵus ricevita materialo de Lingvolanĉilo dum la 24-a Pedagogia Tago en Budapeŝto 8 marto 2008. Legu pli sur p. 31-a!*

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko

***Membroj*:**

Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn; AIS[2] San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, University of Hyderabad; AdE[1]

Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]

Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, Magyar Tudományos Akadémia, Nyelvtudományi Intézet

***Sekretario:* Aida Čižikaitė**, Litovio; estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto

[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Enkonduke

Antaŭ 10 jaroj fondiĝis la unua E-grupo ĉe UAM en Poznań, pri la kursoj raportas la fondinto/gvidanto Ilona KOUTNY. Alia (eks)hungarino, Zsófia KÓRÓDY raportas pri la E-instrua agado de E-Centro en Herzberg, pri la lingvotestada konferenco en Cambridge kaj pri TORPEDO-4 okazonta en oktobro 2008.

En IPR 07/4 vi povis legi artikolon de Dennis KEEFE pri la organizado de Lingvaj Festivaloj. Nun li daŭrigas la temon, donante praktikajn konsilojn. Pro la amplekso de lia materialo, la dua parto de lia grava artikolo povos aperi nur en IPR 08/3.

La „Lerneja malbonfarto" de Raita PYHÄLÄ provas klarigi la pasintjarfinan tragedion en Finnlanda lernejo. IPR servas la instruistojn kaj ne nur la instruadon de E-o mem. Ankaŭ la artikolo de Bardhyl SELIMI estas bona ekzemplo por tiu principo. Ĝin povas ĝui kaj utiligi ne nur matematikistoj.

Laŭ mia persona opinio (sed mi ja estas hungaro) la plej grava novaĵo en la rubriko „*El la landoj kaj sekcioj…*" estas la fakto, ke ILEI/UEA kaj la neesperantista hungara instituto ITK provas kune ellabori sistemon de unulingva E-ekzamenoj.
Bonan legadon!

Jozefo Németh, redaktoro

Dekjariĝo de la Interlingvistikaj Studoj en UAM

de Ilona KOUTNY, *Interlingvistikaj Studoj, UAM, Poznań (PL)*

En la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznań, Pollando) la unua malgranda grupo komencis siajn studojn pri interlingvistiko en 1998. La Studojn fondis kaj gvidas Ilona KOUTNY, kiu transloĝiĝis al Pollando kaj ekinstruis en UAM, laŭ la modelo de la iamaj internaciaj esperantologiaj studoj en ELTE (Budapeŝto), kie ŝi laboris antaŭe.

La Studoj havas surlokan bazon kun kolegoj: Michael FARRIS, lingvisto, Bradio MORO, interlingvisto, kaj Zbigniew GALOR, sociologo. Oni engaĝas polajn fakulojn kiel Maria MAJERCZAK, metodikistinon el la Jagielona Universitato (Krakovo), Lidia LIGĘZA, poetinon, kaj Tomasz CHMIELIK, literaturiston. Enkadre de la Studoj gvidas kursojn elstaraj esperantologoj: Vera BARANDOVSKA-FRANK, Vilmos BENCZIK, Detlev BLANKE, Michel DUC GONINAZ, István ERTL, Aleksander KORĴENKOV, Katalin KOVÁTS, Aleksander MELNIKOV, Humphrey TONKIN, Blazio VAHA kaj John WELLS.

La Studoj altiras pli kaj pli da gestudentoj el diversaj landoj de la mondo.



Foto el la jaro 2004

La stipendioj de ESF subtenas kelkajn gestudentojn. La tria grupo finos siajn studojn en tiu ĉi studjaro.

Programo de la postdiploma studado pri interlingvistiko

La 3-jara ekstera postdiploma studado donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas internaciajn lingvojn kaj planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de E-o. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado. Pro sia komplekseco la studoj estas unikaj.

La instruista trejnado estas sur bona vojo

La metodikan specialiĝon reĝisoris energie ankaŭ ĉi-foje Katalin KOVÁTS, la ekzamenoj dum la lasta sesio en februaro iĝis metiejaj diskutoj de veraj instruistoj. Kurson pri metodiko gvidis Maria MAJERCZAK kaj kontribuis Zsófia KÓRÓDY kaj Ilona KOUTNY. La partoprenantoj havis eblon testi sin mem kaj samtempe la unuan C1-nivelan teston (el la novtipa lingvoekzameno, kiun ILEI ellaboras kun la budapeŝta lingvoinstituto ITK por akreditigo).

La Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI decidis kunlabori en la formado de E-instruistoj, kiu delonge atendis solvon. La kontrakton inter la du institucioj nun subskribis la gvidanto de la Studoj, Ilona KOUTNY, kaj la dekano de la Novfilologia Fakultato de UAM, prof. Józef DARSKI, vicdekano prof. Jacek WITKOŚ, aliflanke Zsófia KÓRÓDY, vic-prezidanto de ILEI.



Grupo de junuloj en februaro 2008

Enkadre de la komuna programo kaj formado estis eblo jam en septembro aliĝi al la metodika specialiĝo de la Studoj, kiu realiĝas en la studjaro 2007/08. La ses aliĝintoj (el 5 landoj) krom la komunaj metodikaj kursoj kaj ekzamenoj povis parto-

preni lingvan perfektigon, minikursojn pri literaturo, historio kaj gramatiko.

Malferma prelego en la Lingvistika Instituto

La nuna interlingvistika grupo (18 persistaj gestudentoj el 10 landoj) – dum sia lasta sesio – partoprenis entuziasme la prelegojn kaj praktikan laboron en tri specialiĝoj: komunikado, lingvistiko kaj metodiko. Okazis kurso pri interkultura komunikado fare de Humphrey TONKIN (lingvo kaj socio), Michael FARRIS (signolingvo kaj parolata lingvo); pri radia komunikado fare de Barbara PIETRZAK (longjara gvidantino de la Esperantaj elsendoj de Radio Polonia, nun ĝenerala sekretario de UEA); pri sociologiaj aspektoj de komunikado fare de Zbigniew GALOR, pri vortospecoj kaj denaskismo fare de Balázs WACHA (Blazio Vaha).

La nunan sesion stampis la intensa kontribuo de Humphrey TONKIN. Li prelegis ankaŭ pri la nuntempaj problemoj de la E-movado por la tuta grupo kaj eksteraj interesiĝantoj. El liaj antaŭaj prelegoj naskiĝis lia libro *Lingvo kaj popolo* (2006). La nova kurso estis denove instiga.

La invititaj gastoj certigas ankaŭ kontaktojn kun aliaj kolegoj en la universitato. Por kolegoj kaj gestudentoj de la Lingvistika Instituto de UAM, kiuj grandnombre aperis malgraŭ la intersemestra feriaro, H. TONKIN prelegis angle pri *Ekskludo kaj inkludo en Eŭropo: serĉado de eŭropa lingvopolitiko* kun granda sukceso. Ankaŭ lia interparolo kun vicrektoro prof. Marek KRĘGLEWSKI (kiu malfermis la publikan lingvopolitikan konferencon de la Studoj en septembro 2006) estis fruktodona.



Aŭskultantoj de Humphrey TONKIN en februaro 2008

Ankaŭ amuziĝo

Kiel tradicie, dum la semajno okazas la komuna vespero de gestudentoj kaj geprelegantoj kun partopreno de poznaniaj esperantistoj. Krom la bonetosa vespermanĝo okazas libera kultura programo. Ekskurso al la bela kastelo kaj parko de Kórnik apud Poznań kompletigis la kulturan programon ĉi-foje. La septembrajn sesiojn sekvas la riĉa kultura programo de Arkones.

Interlingvistika simpozio kaj nova starto

La Interlingvistikaj Studoj festos siajn 10-jarojn da ekzistado en septembro (18-19) per solena interlingvistika simpozio, al kiu ni invitas ĉiujn niajn ĝisnunajn prelegantojn kaj gestudentojn kun aŭ sen prelego. Ni bonvenigas ankaŭ ĉiujn interesiĝantojn por la abunda programo, kiun eblas ligi kun la kultura aranĝo Arkones (19-21.09.2008).

Novaj aliĝantoj povos komenci siajn 3-jarajn studojn (unua sesio: 13-17.09). Paralele okazos la sekva unujara instruista trejnado de UAM-ILEI. (Informoj: <*interlin@amu.edu.pl*>)

Lingva Festivalo:
Kiel starigi kaj organizi LF en via urbo?

de Dennis KEEFE


(Parto I-a)

Lingva Festivalo (LF) estas speciala evento en kiu lingvoj estas instruataj al ĝenerala publiko per specimenaj lecionoj kiuj daŭras malpli ol unu horon.[1] En mia lasta artikolo pri LF, mi priparolis kelkajn ideojn por fari efikan kaj interesan kurseton por ĝenerala publiko.[2] Nun mi volas iom priskribi la organizadon mem de la festivalo: kion oni devas fari, ekzemple, por trovi kursgvidantojn, kaj kiamaniere oni povas organizi la tagon de la festivalo. Krome, mi priparolos la aldonon aŭ ne de kromaktivaĵoj kiel

[1] Pri la diferenco inter Lingva *Festivalo* kaj Lingva *Foiro*, vidu «Lingva Festivalo ne estas Lingva Foiro»: www.liberafolio.org

[2] IPR 2007/4 «Lingva Festivalo – Kiel fari efikajn, interesajn kursetojn por ĝenerala publiko»

internacia muziko kaj standoj. Mi ankaŭ priparolos rimedojn por anonci kaj reklami vian festivalon. Kune, la unua artikolo pri la kurso mem, kaj ĉi tiu dua artikolo pri la organizado de tiuj kursoj donos al vi, eventuala organizanto de LF, kelkajn utilajn ideojn kiujn vi modifos laŭ viaj lokaj cirkonstancoj por fari kompletan, sukcesan Lingvan Festivalon.



La aŭtoro kun esperantisto Peng el Wuhano ĉe la Budhana Templo en Duobao, Ĉinio, la templo de fama ĉina esperantisto Miaohui.

Ni memoru, ke en LF ĉiuj lingvoj, grandaj aŭ malgrandaj, prestiĝaj aŭ senprestiĝaj, rajtas esti prezentataj. La unua LF en Tours, Francio en la jaro 1995 havis 32 lingvojn, 96 kursetojn, kaj 789 gelernantojn. La plimulto el tiuj lingvoj estis malgrandaj. La tria de tiu sama urbo havis 85 lingvojn, 254 kursojn, kaj pli ol 3600 personojn kiuj ĉeestis la lecionojn, do granda kvanto de nekonataj, neprestiĝaj lingvoj.

Post la unuaj LF-oj en Francio kaj favoraj artikoloj en *Heroldo de Esperanto* en 1995 kaj 1996, la festivalo rapide etendiĝis en aliajn landojn kun la komenco de la granda LF en Ĉeboksaro fare de Aleksandr BLINOV, kaj pli malgrandskale aliloke kiel en Finnlando fare de Mathi LATHINEN.

Hodiaŭ LF komencas kreski rapide en multaj landoj kaj ĝis nun okazis almenaŭ unufoje en verŝajne pli ol dudek landoj, kiel Armenio, Belgio, Bosnio kaj Hercegovino, Brazilo, Danio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Irano, Japanio, Jugoslavio/ Serbio, Litovio, Luksemburgio, Pollando, Rusio, Slovakio, Slovenio, Svedio, Ukrainio kaj Usono. Speciale en Rusio, danke al Aleksandr BLINOV kaj aliaj esperantistoj, LF okazis, ofte ĉiujare,

en multaj urboj: Ĉeboksaro, Ivanovo, Kovrov, Moskvo, Sankt-Peterburgo, Tiĥin, Uljanovsk, kaj Volgogrado.[3]

Sed antaŭ ol skizi la diversajn partojn de modelo kiun vi povos libere utiligi por via LF, mi volas substreki du aferojn: unue, ke vi *ne* bezonas fari grandan LF ekde via unua festivalo. Vi povas komenci per tre malgranda LF, utiligante nur kelkajn lingvojn. Dek instruataj lingvoj dum posttagmezo povas sufiĉi. Due, memoru, ke vi povas fari Lingvan Festivalon laŭ via maniero kaj laŭ viaj lokaj cirkonstancoj. En ĉi tiu artikolo, mi priskribas modelon kiu eble helpos al vi pripensi pli profunde la organizon, sed vi mem kiel venonta organizanto de festivalo havos vian propran stilon kaj metodon.

La partoj de la modelo por starigo kaj organizado de LF-oj inkluzivas erojn kiujn vi aranĝos *antaŭ kaj dum* la LF. Por la antaŭaj eroj vi planos daton, lokon, lingvojn instruatajn, kursgvidantojn, trejnadon, informadon kaj reklamadon, kromaktivaĵojn, la budĝeton ktp.

Ni komencu kun kelkaj ideoj pri la dato. Se la dato estas bona, la kvanto da partoprenantoj en la festivalo povas multobliĝi. Do, en kiu sezono, en kiu tago okazos via LF? Tio kompreneble dependas de via loka situacio. Por elekti la bonan daton vi devas pensi kaj pri la ĉeestonta publiko kaj pri la instruontaj kursgvidantoj. Se via LF estas proksime de universitato kaj vi esperas, ke multe da studentoj venos, vi kompreneble okazigos LF dum la lernojaro. Estus bone tiuokaze, ke vi parolu kun lokaj studentoj por trovi la plej bonajn datojn.

Vi devas pensi ankaŭ pri viaj instruontoj, kiam vi elektas la daton. Kutime, speciale por la unua LF en urbo, vi bezonos multe da tempo por trovi instruantojn, kaj poste trejni ilin por partoprenado en la LF. Se vi okazigas vian festivalon tuj post longaj, ekzemple, someraj ferioj, povos esti ege malfacile ĝustatempe organizi la instruadan flankon de LF.

Pri la tagoj kaj horoj, kutime la plejparto de niaj LF-oj okazas semajnfine. En la urbo Tours en Francio, ni faris la unuan LF nur sabate, inter la 10-a matene kaj la 19-a vespere. En la dua, ni aranĝis ĝin por du tagoj, sabate kaj dimanĉe, aldonante pluan horon vespere. En la tria festivalo, ni faris la saman aranĝon, sed aldonis prelegserion kiu komen-

[3] Ne nombritaj ĉi tie estas la tiel nomataj kvartalaj LF-oj, en kiuj estas malpli ol dek lingvoj instruataj. Aliflanke, kelkaj Lingvaj *Festivaloj* pli bone kategoriiĝis kiel Lingvaj *Foiroj*, sed mi ankoraŭ ne havas sufiĉe da informo por fari bonan klasifikon.

ciĝis unu monaton antaŭ la LF mem.[4] Tiuj prelegoj, ofte anoncitaj en la loka ĵurnalo, helpis iomete diskonigi la alvenon de la granda festivalo. Mi rekomendas, ke por via unua LF vi faru nur unu tagoparton, ekzemple, posttagmezon, eble inter la 2-a kaj la 6-a, do kvar horojn entute. Kompreneble tiu horaro dependas de viaj lokaj kutimoj. En Hispanio, mi ne rekomendas tiujn horojn ĉar hispanoj ofte tagmanĝas ĝis la 4-a posttagmeze.

Se vi jam pripensis la bonan daton, la bonan tagon, kaj la bonan horaron, vi ankaŭ devas eleki la bonan lokon. La grandaj LF-oj de Tours ĉiam okazis interne. La festivaloj de Ĉeboksaro kaj la plejparto el la aliaj LF-oj same okazis interne. Ni memoru, ke LF estas instruado de lingvoj per mallongaj kursetoj. Tiuj fulmokursoj devas komenciĝi ĝustatempe kaj finiĝi ĝustatempe. La kursgvidantoj bezonas klare aŭdigi sian voĉon, kaj aŭdi la ĉeestantaron. Granda nigra aŭ blanka tabulo estas tre utila por instrui. Ĉio ĉi bezonas internan lokon, unuvorte, klasĉambron.

Tamen kelkaj aliaj LF-oj okazis ekstere, ekzemple sur placo aŭ en parko. La LF nomata *Ars et Langues* en Strasburgo, Francio okazis ekstere. La ILEI-LF en Parma, Italio estis en korto de la urba biblioteko de tiu urbo. Kvankam mi ne rekomendas tiun eksteran modelon, ekzistas kialoj por meti la LF eksteren. Se la vetero estas agrabla kaj ne pluvas, la fulmokursoj povas esti agrablaj. Ekstera LF povas altiri la atenton kaj eblan partoprenon de preterpasantoj. Se la LF estas malgranda kaj ne havas multe da kursoj samtempe, estas relative facile trovi la deziratan kurson; vi ne bezonos rigoran sistemon de informado de kursoj, lokoj, kaj horoj.[5]

Supozante, ke via LF okazos en konstruaĵo, kiu ejo estus la plej bona? Unue, pensu pri centra loko por ke la ĉeestontoj povu facile atingi vian ejon piede, buse, aŭte, ktp.[6] Pro la fakto, ke probable via LF okazos semajnfine, kutime estas pli da bonaj, liberaj ejoj por aranĝo de kursoj. Tutsimple, la plej bona konstruaĵotipo estas lernejo aŭ lernejsimila loko. Tiu lernejo povas esti universitato aŭ mezlernejo ekzemple. En Usono ni faris unutagan festivalon ĉe la Universitato de Illinois en la konstruaĵo nomata *Foreign Languages Building*, tio estas la *Konstruaĵo por Fremdaj*

[4] La prelegserio estis organizita de neesperantista Beata PLONKA, kiu ankaŭ instruis la polan lingvon dum LF.

[5] Memoru, ke ne estas nur unu modelo de LF, do vi povas eksperimenti per novaj aranĝmanieroj por via LF.

[6] Multe da LF utiligas univesitaton kiel lokon. En tia cirkonstanco, centreco ne tiom gravas se la partoprenantoj estas ĉefe studentoj.

Lingvoj. Tiu speciala ejo permesis al ni instrui, samtempe, 18 lingvojn en klasĉambroj jam formitaj por lingvolernado.[7]

La Granda LF de Tours komenciĝis en kultura centro, kiu havas 14 ĉambrojn, kie ni instruis 12 lingvojn ĉiuhore laŭlonge de la festivalo. Tiu ejo, malsimile al tiu de Usono, ne havis verajn klasĉambrojn, sed ĉambrojn por dumsemajnaj kunvenoj de lokaj asocioj. Ili estis ege malsimilaj laŭ kapacito. Ekzemple, kelkaj enhavis nur 10 sidlokojn dum aliaj enhavis 20 aŭ 50 aŭ 60, kaj la plej granda enhavis 100 sidlokojn. En tia festivalejo, via planado komplikiĝas, ĉar vi devas meti la popularajn (laŭ la nombro de ĉeestontoj) en la grandajn ĉambrojn, kaj la malpli popularajn en la malgrandajn.

Do via planado varias laŭ la eco de la ejo. Mi rekomendas, ke vi faru vian LF-on en ejo kie ĉiuj ĉambroj similas, tiel ke vi povas meti iun ajn lingvon en iun ajn ĉambron. Se, tamen, vi troviĝos en loko kie la ĉambroj ege malsimilas je grandeco, vi devas pensi pri pluraj aferoj por sukcese plani. Unue, mi rekomendas, ke vi analizu vian lokan situacion. Kiuj lingvoj, vi pensas, estos la plej popularaj? Mi faris simile en Tours, sed por plipreciziĝi mian planadon mi faris enketon ĉe la Universitato François Rabelais de Tours kun 300 studentoj. Laŭ tiu enketo mi kalkulis la popularecon de individuaj lingvoj kaj uzis tion por doni la ĉambrojn al la lingvoj.[8]

Se viaj lernoĉambroj havas diversajn grandojn, vi devas ne nur pensi pri la popularеco de la lingvo, sed ankaŭ pri la personeco de la kursgvidanto. Memoru, ke plejparte la kursgvidantoj ne estas profesiaj lingvoinstruistoj. En la tria LF de Francio, el la proksimume 100 personoj kiuj gvidis kurson, nur eble kvin profesie instruadis lingvon. Tio estas natura sekvo de LF pro la fakto, ke unu ĉefcelo estas instrui lingvojn kiujn oni loke ne instruas. Pro la manko de sperto, ofte la instruantoj mem ne volas instrui en granda ĉambro al granda grupo da personoj. En la usona festivalo, ni sciis, ke la svisa germana lingvo estos tre populara dum la

[7] La avantaĝo de klasĉambroj por LF estas, ke ili jam havas la bonan grandon, ke ili estas ekipitaj per tabuloj, skribiloj ktp., kaj, ke ili troviĝas en laŭvica aranĝo, kio faciligas la trovadon de la kursoj.

[8] Konkrete por la enketo ni montris al studentoj la liston de la instruotaj lingvoj de la LF, kaj demandis ilin, se ili ĉeestus la festivalon, kiujn tri lingvajn kursetojn ili eventuale ĉeestus. La rezultoj montris kelkajn surprizojn. Ekzemple per tiu enketo ni eksciis, ke estos multe da personoj por lerni la italan kaj ankaŭ francajn kreolajn lingvojn. Ni donis al tiuj lingvoj pli grandajn klasĉambrojn.

festivalo, sed tamen por respekti la deziron de la kursgvidantino, kiu antaŭe neniam instruis lingvon, ni donis al ŝi la plej malgrandan klasĉambron.

La plej grava elemento de la sukceso de via LF estos la kursgvidantoj kaj la lingvoj instruataj de ili. Vi memoras, ke la ĉefa trajto de LF estas, ke ĉiuj lingvoj rajtas partopreni, kaj ke neniu lingvo havas prioratatan dum la festivalo. Tiu filozofio de LF multe kontraŭstaras la komercan sintenon de la Komercaj Lingvaj Foiroj, kiel *Expolingua* de Madrido aŭ *Expolangues* de Parizo, kie la ĉefaj lokoj rezerviĝas por la potencaj lingvoj kiuj pagas la plej altajn monsumojn por la plej grandaj standoj.

Do lingvoj estas ĉe la koro de la LF. Kiamaniere vi povas trovi tiujn lingvojn, speciale se ili ne estas instruataj en via urbo? Kaj kiamaniere vi povas trovi la kursgvidantojn de tiuj lingvoj? Estas multe da manieroj, kaj ni povas trarigardi kelkajn, per kiuj LF-anoj faris tiun taskon. Ĝenerale unue pripensu kiel vi povas trovi lingvojn el unu aŭ alia kontinento, ekzemple, tiujn de Eŭropo. Estas la ofte instruataj: la hispana, la franca, la germana, la angla, kaj ankaŭ la portugala kaj itala. Sed ne forgesu, ke multaj landoj havas tre vivantajn regionajn lingvojn. Hispanio estas bona ekzemplo kun la kataluna, la galega, la eŭska, kaj kelkaj aliaj variantoj.

En Azio, kompreneble troviĝas grandaj lingvoj kiel la ĉina, la japana, la korea, la indonezia kaj la hinda, sed multaj landoj estas plenplenaj je gravaj regionaj lingvoj. Ekzemple, en la usona festivalo kiun mi organizis ĉe la Universitato de Illinois, el la 65 lingvoj 12 devenis de Hinda Unio (Barato). Ankaŭ en la festivaloj de Francio, ni trovis plurajn regionajn lingvojn el Indonezio.

En alia kontinento, Sudameriko, oni pensas ĉefe pri la hispana kaj portugala lingvoj, sed tie ankaŭ troviĝas la keĉua, la ajmara kaj la guarania lingvoj de la indiĝenaj loĝantoj.

Unu el la plej riĉaj fontoj de lingvoj por via LF estas Afriko: svahila, volofa, kikunga, munukutuba, fona, sanga, berbera, mina kaj dekoj, eĉ centoj da aliaj disponeblas en la grandaj kaj mezgrandaj urboj de Eŭropo. En la LF de Tours, kutime estas pli ol 15 afrikaj lingvoj instruataj, kaj en la granda LF de Tours, eble 25 el la 85 lingvoj devenis de Afriko.

Sed pensu ne nur pri la grandaj kaj malgrandaj lingvoj de la kvin kontinentoj, pensu kreive. LF estas bona momento en kiu vi povos eduki la publikon ne nur pri ĉiuj lingvoj sed ankaŭ pri ĉiaj komunikebloj modernaj kaj antikvaj. Do, atentu ne nur pri vivantaj lingvoj, sed ankaŭ pri mortintaj aŭ preskaŭ mortintaj lingvoj, ekzemple pri la latina aŭ antikva greka, aŭ eble pri aliaj klasikaj lingvoj kiel la sanskrita. Pensu ankaŭ pri dialektoj kaj

variantoj – kaj space kaj tempe. Ekzemple, estas multe da kreolaj lingvoj. La ĉina lingvo havas dialektojn kiuj estas veraj lingvoj, kiel tiu de Honkongo aŭ tiu de Ŝanhajo, ekzemple. Simile ni povas pensi pri variantoj de la araba lingvo inter la nordafrikaj landoj kaj la mezorientaj landoj. Krom tiuj spacaj lingvo-variantoj, estas ankaŭ tempaj variantoj. Se la LF okazas en Usono, eble vi povas havi fulmokurson pri *Old English* kaj *Middle English* (malnova kaj meza angla). En Francio kaj en aliaj eŭropaj landoj, eblas fari simile.

Pensu ankaŭ pri antikvaĵoj. LF estas tre bona momento enkonduki la publikon en la mondon de antikvaj hieroglifoj, aŭ kojnoformo, aŭ eble kaligrafiaj skribsistemoj de la mezepoko, ekzemple, skribmanieroj utiligataj en la tiamaj monaĥejoj.

Memoru ankaŭ pri komunikado. En multe da LF tra la tuta mondo, tre populara fulmokurso estas la mansigna lingvo. En la LF de Tours, tiu lingvo estis multjare la plej ofte vizitata kurso. Ankaŭ brajla kurso eblas, kaj ĉiam havas entuziasmajn instruantojn kaj lernantojn dum la festivalo. Kaj eble la plej originala leciono kiun mi iam ajn vidis en Francio estis la fulmokurso pri tio, kiel Afrikanoj en Zairio komunikas per tamburoj![9]

Nun vi havas en la menso eblajn lingvojn por via LF, sed kiamaniere trovi la lingvojn, kaj speciale kiamaniere trovi la kursgvidantojn por tiuj lingvoj? Ankaŭ ĉi tie mi rekomendas, ke vi pensu kreive kaj netradicie. La lingvoj kaj la kursgvidantoj disponeblaj dependas, kompreneble, de viaj lokaj cirkonstancoj, sed kutime profesia instruanto de lingvoj, ekzemple, de la angla, ne estas bona persono por respondeci pri serĉado kaj trovado de la lingvoj por LF. Eble tio ŝajnas paradokso, sed profesia instruisto ĉefe pensas pri sia lingvo, ne pri la aliaj. Do la plej bona persono por estri la serĉadon de kursgvidantoj estas... *esperantisto!*[10] Esperantisto facile akceptas minoritatajn kaj neprestiĝajn lingvojn en la festivalon.

---

[9] Tiun kurson instruis José KANDO, devene de Zairio, kiu studis sociologion kaj iĝis specialisto pri tiu komunikado. Liaj kursetoj estis tiel popularaj kaj laŭtaj, ke post la unua LF, li instruis en granda aparta klasĉambro pro la bruo de la tamburo!

[10] E-o, laŭ mi devas ludi gravan rolon en Lingvaj Festivaloj. Mi esperas, ke niaj lokaj grupoj de e-istoj subtenos multajn LF. Tiurilate, mi jam skribis en 1996, ke mi pensas, ke ideala loko por LF estas la UK de E-o, kaj tion mi jam proponis dum kunveno ĉe UEA en Roterdamo. Se e-istoj subtenas kaj gvidas LF-ojn, tio povas rapide altiri la atenton de la amaskomunikiloj kaj ekhavi tre favoran efikon rilate E-on.

Instruisto de la franca lingvo aŭ instruisto de alia granda lingvo, kutime pensas pri tio, kiamaniere antaŭenigi siajn proprajn lingvojn, kaj malfacile metas sin en la rolon de lingvoprotektanto por ĉiuj.

Kie trovi la lingvojn? Bona loko por komenci serĉi kursgvidantojn kaj lingvojn estas universitato, speciale se via loka universitato havas multe da internaciaj studentoj. Multaj el viaj kursoj povas esti prezentataj de fremdaj studentoj.[11] Kiam mi starigis la unuan LF en Usono, mi iris al pluraj fakoj de la universitato kaj demandis, ĉu ili eble havas internaciajn studentojn kiuj eventuale interesiĝos pri la LF. Tion mi faris en la fakoj pri fremdaj lingvoj, la fako pri lingvistiko, la fako pri antikvaj lingvoj, la fako pri la angla kiel fremda lingvo. Sed mi vizitis ankaŭ la fakon pri historio, la sociologian fakon, kaj eĉ la fakon pri komerco. En tiaj lokoj mi trovis multe da interesataj, internaciaj studentoj kiuj volis partopreni en la festivalo.[12] Aliflanke, mi kutime ne trovis multe da universitataj profesoroj kiuj volis instrui lingvon, sed estis esceptoj. Mi speciale memoras pri unu profesoro kiu ege ĝojis, ke li finfine povas instrui unu el la lingvoj el la antikva Egiptio angle nomata *Old Nubian* (malnova nubia).

Dum universitato estas bona fonto por trovi kursgvidantojn, alia tre utila estas la tiel nomataj *centroj por enmigrintoj*. Tiuj centroj ekzistas en multaj landoj, kaj mi trovis eble 7 aŭ 8 el la 32 lingvoj de la unua LF tie. Tiaj enmigrintoj ofte estas tre entuziasmaj rilate Lingvan Festivalon. Ili tre ĝojas, ke ili havas ŝancon prezenti siajn landon kaj kulturon en sia nova lando. En Tours, ankaŭ la instruistino en tiu centro ege ĝojis pro la partopreno en la LF, ĉar ŝi pensis, ke estas bona maniero helpi tiujn enmigrintojn kontaktiĝi kun la lokanoj.

Estas multe da aliaj manieroj trovi lingvojn kaj kursgvidantojn. En Usono mi trovis la instruanton de la moderna greka lingvo pere de ortodoksa greka preĝejo. En Francio, mi trovis instruanton de la cigana lingvo pere de la franclingva instruistino de ciganaj infanoj. Vizitante kafejojn en Tours, Francio, mi trovis kelkajn afrikajn lingvojn. Irante al junulkafejo, mi konvinkis dekokjarulon instrui la francan ĵargonan lingvon *Verlan*. Aĉetante varojn en afrika butiko, mi havigis la buluan lingvon el Kamerunio kaj

[11] Studentaj instruantoj por LF havas la avantaĝon, ke ili kutime tre entuziasme kaj bone instruas, sed la malavantaĝon, ke ili restas ĉe la universitato nur mallongan tempon, do en sekvaj LF, novaj instruantoj devas esti trovataj kaj trejnataj.

[12] Tre bona sperto por e-isto, kaj tre bona maniero komenci kunlabori kun neesperantistoj, kiuj poste havos pli favoran opinion pri E-o.

aliajn afrikajn lingvojn por la festivalo. Manĝante en eksterlandaj restoracioj, mi povis trovi personojn kiuj konis la ĉeĥan kaj la slovakan lingvojn (fakte, la paro estas patrino kaj filino).

Utiligante la telefonlibron, mi povis kontakti instruantojn de la mansigna lingvo kaj brajlo. Helpis ankaŭ viziti asociojn kaj fremdajn klubojn kaj asociojn. Tiamaniere mi trovis plurajn. En la jaro 1996 por la dua LF de Tours, eble la plej malfacile trovebla kursgvidanto estis tiu de la ĉina lingvo, kvankam mi kaj mia edzino vizitis multege da ĉinaj restoracioj! Tamen finfine ni trovis nian kursgvidanton por la ĉina lingvo – en restoracio – en *japana* restoracio!

Skribante kaj telefonante, mi kontaktis pli ol 100 konsulejojn kaj ambasadejon en Parizo por inviti ilin instrui en la 3-a LF de Tours. Tiu fonto aldonis nur kvar aŭ kvin lingvojn el la 85 instruataj, sed kelkaj ambasadejoj ege interesiĝis pri pli granda partopreno en sekvaj jaroj.

(*daŭrigota*)

La defio de la politiko de plurlingveco kaj lingvolernado

de **D-ro Seán Ó RIAIN** – *Eŭropa Komisiono* – Irlando

Ekzistas certa kompreno de la lingvouzado kiel ia "natura fenomemo", kiun ni ne povas konscie influi, iom kiel la vetero. Se tio estus vera, Israelo ne parolus la hebrean hodiaŭ, kaj Turkio ne uzus la latinan alfabeton. Kiam januare 2007 EU nomumis sian unuan Komisionanon por Plurlingveco, la rumanon Leonard ORBAN, kelkaj anoj de la Eŭropa Parlamento ne komprenis kial necesis tia nova posteno. Ili ŝajne ne konsciis kelkajn gravajn lastatempajn evoluojn en ĉi tiu kampo, kiuj montras la bezonon de pli sistema kaj objektiva aliro al la lingvopolitiko de EU[13].

Kiel irlanda diplomato kiu ĵus eklaboris pruntedone en la Eŭropa Komisiono, kaj kies doktoriĝa tezo pritraktas la lingvoplanadon en Irlando kaj en Kebekio, mi aparte interesiĝas pri lingvopolitikaj evoluoj. Portempe mi nun laboras en la plej granda tradukejo en la mondo, kie 2500

[13] Kiel tiu de *Gesellschaft für Interlinguistik* e.V/GIL, vd. http://www.interlinguistik-gil.de/

tradukistoj komprenebligas la agadon de EU tra 23 oficialaj laborlingvoj al 492 milionoj da homoj en la 27 membroŝtatoj. Kial ni interesiĝu pri lingvopolitiko? Pro tio, ke la kreskanta dominado de la angla en Eŭropo pli kaj pli endanĝerigas la samrajtecon de civitanoj, kaj do de la demokratio mem, kaj de ĉiuj aliaj lingvoj. Eble, vi malfacile povas imagi tion. Tamen, ni pripensu la sekvan eron de la historio de Irlando: en 1800 Irlando ankoraŭ plejmulte parolis irlande en la ĉiutaga vivo. Tiutempe verkistoj ne povis imagi, ke Irlando povus iĝi angleparolanta. Tamen, ĝis 1851 ĝuste tia ĝi fariĝis. La ĉefa defio kiun alfrontas la lingvopolitiko de EU estas defendi la lingvan diversecon. Plejmulte ni emas ŝati ruĝajn rozojn, sed ĉu ni volas ĝardenon de ruĝaj rozoj kiu havos neniun alian floron?

Kelkaj lastatempaj evoluoj en la lingvopolitiko en EU

En 2003 publikiĝis la fama verko de profesoro Robert PHILLIPSON, *Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al Lingvopolitiko*[14], kiu zorge klarigis, sen lasi dubon, la nunan lingvan direkton de Eŭropo. En 2005 la Raporto Grin montris, ke la nuna internacia dominado de la angla lingvo alportas € 17 miliardojn jare al la brita ekonomio, kaj 4% de tiu sumo al Irlando. Sekvadis malpliiĝo de motivado en la anglalingvaj landoj por studi aliajn lingvojn. Ekzemple, en 2002 oni rajtigis britajn infanojn ĉesigi la studadon de fremdlingvoj je la aĝo de 14 – decido kiu provokis publikan komunan proteston de la ambasadoroj de Francio, Germanio, Hispanio kaj Italio. En 2006 la germana Eŭropa Parlamentano Michael GAHLER postulis malpliigon de la kvanto de britaj kaj irlandaj civitanoj kiujn dungas la EU-instancoj, por kompensi la avantaĝon kiun donas la kreskanta uzo de ilia denaska lingvo kiel *lingua franca* de EU. En marto 2007 la slovaka vicĉefministro Dušan ČAPLOVIĆ skribis al ĉiuj ministroj pri eksteraj aferoj de la EU-landoj por altiri atenton al la Raporto Grin kaj proponi diskutadon de la EU-lingvopolitiko je inter-registara nivelo. En majo 2007 la itala ministrino pri eŭropaj aferoj, Emma BONINO, publike subtenis la slovakan iniciaton dum konferenco en Bruselo. Fine, la 9-an de majo 2007[15], la

[14] Routledge 2003, majstre esperantigis ĝin István ERTL, UEA 2004. Vidu ankaŭ Claude PIRON 1994, Le défi des langues, L'Harmattan, por klara analizo de la problemoj, kiujn kaŭzas la internacia anglalingva dominado.

[15] Tuta raporto, france, ĉe *http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf*. Estas unupaĝa resumo en 24 lingvoj, aprobita de profesoro GRIN, ĉe *http://lingvo.org/grin/*.

nobelpremiito profesoro Reinhard SELTEN, dum ceremonio en la Eŭropa Parlamento en Bruselo, proponis

> "*ke iuj EU-ŝtatoj devus akordiĝi antaŭenigi la instruadon de Esperanto kiel la unua fremdlingvo en siaj lernejoj, por plibonigi la lingvolernadon ĝenerale, ĉar la lernfaciliga efiko estas tiel forta, ke pli rapide oni lernas fremdlingvon tiel ol lerni nur la fremdlingvon*"[16].



De maldekstre: Seán Ó RIAIN, Ranieri CLERICI kaj Jiří SUCHÁNEK [17]

La Irlanda lingvo-subiro kaj reveno

La Irlanda estas kelta lingvo kiu havas skriban literaturon ekde la jaro 597 A.D., kaj tiel estas unu el la plej malnovaj literaturaj lingvoj de Eŭropo. Oni foje erarige nomas ĝin la *gaela*, la genra termino. La mallongigo GA venas de la irlanda vorto por la lingvo, *Gaeilge*, sed nomi ĝin *gaela*, *Gaelic*, *gaélique* ktp. tiom malprecizas kiom nomi la anglan ĝerma-

[16] Plena teksto ĉe *http://www.liberafolio.org/2007/seltenparolado*

[17] *NdlR*: Farita dum lingvopolitika konferenco en Bratislavo, okazinta 24-25 nov. 2006. Fonto: *http://www.europo.eu/pictures/full/39_fotoBA14.jpg*

na. La lingvo ne havas verbon *havi*, sed por esprimi la ideon *esti*, ĝi havas kaj la hispanan distingon *ser/estar (is/tá)*, kaj la polan kaj alian slavan kontraston *jest/bywa (tá/bíonn)*.

Dum du mil jaroj la irlanda estis la lingvo de la tuta Irlando, kaj dum pluraj jarcentoj de preskaŭ la tuta Skotlando[18], kiel klare montras la lokonomoj. Ĝin paroladis 5 milionoj dum la 1840-oj, kiam la irlanda loĝantaro de 9 milionoj estis ĉirkaŭ duono de la tiama loĝantaro de Britio. La unuaj leĝoj de la britaj koloniistoj kontraŭ la irlanda lingvo estas de 1366, la fifama *Statuto de Kilkenny*. Magraŭ tio ĝi restis la lingvo de la plejmulto de la irlandanoj ĝis la mezo de la 19-a jarcento. Serio de faktoroj tiam kondukis al katastrofa subiro. Por mencii nur unu: la malsatego de 1845-49, dum kiu 1-2 milionoj mortis pro malsato. En 1891 nur 3% de la infanoj parolis irlande denaske, kaj estis timo, ke la lingvo tute malaperos. Tamen en 1893 fondiĝis nova popola movado, *Conradh na Gaeilge* (la irlandlingva ligo), kiu kaj savis la lingvon kaj kondukis la landon al la politika sendependeco en 1922. La unua decido de la unua sendependa irlanda registaro en februaro 1922 igis la studadon de la irlanda deviga dum almenaŭ unu horo tage por ĉiuj infanoj en la unua- kaj duagrada lernejoj.

Danke al la forta subteno de kaj la registaro kaj la popolo, la irlanda plifortiĝis lastatempe: Konstanta kresko de la kvanto de irlandlingvaj lernejoj ekde 1972; irlandlingva televida stacio, *TG4*, ekde 1996; la brita registaro konsentis fari konkretajn elpaŝojn por antaŭenigi la irlandan en Nordirlando en la *Interkonsento de Sankta Vendredo* inter Irlando kaj Britio en 1998; la unua ĉiutaga gazeto en la irlanda, *Lá Nua* (nova tago), en 2002; la Leĝo pri la Oficialaj Lingvoj de 2003 – la unua leĝo kies celo estas la laŭŝtupa kreskado de la uzo de la irlanda. Ekstreman psikologian gravecon havis la unuvoĉa decido de la EU-Konsilio de Ministroj la 13-an de junio 2005 igi la irlandan unu el la oficialaj laborlingvoj de EU. Tiu decido sekvis kampanjon kiu altiris milojn da manifestantoj sur la stratojn de Dublino kaj arigis pli ol 80 000 subskribojn.

Malgraŭ tiuj gravaj progresoj, estas profunda krizo en la instruado de la irlanda. La raportoj Harris de 1984 kaj 2006[19], pri la instruado de la irlanda en unuagradaj lernejoj, montris, ke 96% de la studentoj de la irlandlingvaj lernejoj, Gaelscoileanna, regis ambaŭ lingvojn; sed, ke en la angla-

[18] La latina vorto *scotus* signifis simple *irlandeparolanto* – ne gravis de kiu lando.

[19] D-ro John HARRIS 2006, Irish in Primary Schools. Dublino: Ministrejo pri Edukado kaj Scienco.

lingvaj lernejoj 70% de la studentoj malmulte progresas en la lernado de la irlanda. Tio kondukis al iom da kritikado pri la eliteco de la lingvolernado: nur elito ellernas la irlandan, kaj la eduksistemo havas la neintencan efikon: ĝi malhelpas la plejmulton havi pozitivan sperton de lingvolernado kaj plurlingveco.

Ĉu la lernfaciliga efiko povus plibonigi la instruadon de la Irlanda?

Kio estas la propedeŭtika, aŭ pli klare lernfaciliga, efiko? Ĝenerale akceptatas, ke la ellerno de iu ajn lingvo emas plibonigi la postan lingvolernadon – okazas transfero de la lingvolernaj lertoj. Ekzemple, la *Modelo Biberacher*, t.e. mallongaj preparaj kursoj en la latina por plibonigi la sekvan lingvolernadon, uzatas en 60 duagradaj lernejoj en Baden-Württemberg.[20] La specifa problemo en Irlando estas, ke la dua lingvo kiun oni plej ofte studas, la irlanda, estas malfacila laŭ la plimulto de la studentoj, kaj, ke ilia manko de sukceso en la irlanda konvinkas ilin eĉ ne provi lerni aliajn lingvojn. Kial angleparolantoj trovas la irlandan malfacila? Pro ĝia strukturo, kiu ege malsimilas la anglan; pro la esceptoj al ĝiaj gramatikaj reguloj, kaj pro la esceptoj al la esceptoj. La ideo pri regula, facile lernebla lingvo, kiel travadoŝtono al la lernado de la pli malfacilaj naciaj lingvoj ne novas, sed kiel la metra sistemo[21], bezonas tempon por atingi ĝeneralan akcepton.

Malpli gravas kiu lingvo uzotas ol la fakto, ke ĝia strukturo devas kontribui al rapida kaj facila lernebleco. Ni agnosku, tamen, ke Esperanto ŝajnas havi pli evoluintajn lernfaciligajn ecojn, pro siaj strukturo kaj internacieco, sed mi bezonas doni multajn detalojn pri tio al la homoj kiuj ne jam konas ĝin. La itala ministrejo pri edukado jam listigis longan serion de eksperimentoj kiuj montris la potencialon de E-o[22], kaj ekzistas ampleksa literaturo.[23]

---

[20] *Frankfurter Allgemeine Zeitung*, 30 decembro 2006.

[21] Francio akceptis la metran sistemon en 1791; Usono, Liberio kaj Birmo ankoraŭ ĝin ne akceptis.

[22] Vidu studon ĉe *http://www.internacialingvo.org/public/126_plena.htm.*

[23] *http://ilei.info/ipr/smide'liusz.htm*. Vidu ankaŭ Lobin, Günter, 2002: *Ein Sprachmodell für den Fremdsprachenunterricht. Der propädeutische Wert einer Plansprache in der Fremdsprachenpädagogik*. Aachen: Shaker, doktoriga tezo.

Similas la principo al lerni piediri antaŭ ol kuri, lerni skiadon unue sur malpli krutaj deklivoj antaŭ ol alfronti Alpojn, aŭ eklerni biologion per la travidebla skeleto antaŭ ol studadi la pli komplikan homan korpon. La memfido kiun donas la regado de atingeblaj celoj emas helpi studentojn ellerni pli malfacilajn lingvojn. Gustumigi lernsukceson al la pli malfortaj studentoj igus la lingvolernadon pli demokrata kaj populara. Kelkaj eksperimentoj, kiel tiuj de la Kibernetika Fakultato de la Universitato de Paderborn, Germanio, per la uzo de E-o eĉ montris, ke la tempo kiun prenas la lernfaciliga kurso estas malpli ol la gajno pro la pli rapida sekva lingvolernado.

La nuna laboro en Britio en tiu kampo estas aparte interesa[24]: 110 studentoj ekstudis E-on lerneje cele al plialtigo de lingva konscio kaj pli bona sekva lingvolernado septembre 2006, kaj temas jam pri 230 studentoj en kvar lernejoj. La rezultoj estos interesaj.



Ĉu tiu laboro povus plibonigi la instruadon de la irlanda? Ankoraŭ ne estas klara respondo, sed certe indas esplori. D-ro Eugene MCKENDRY, Direktoro de la Centro pri Lingvoinstruado de la Universitato de Belfast, Nordirlando, proponis, ke oni testu tiun tezon en la praktiko, dum prelego en Trinity College, Dublin en 2006.[25] Aldone li pritraktis la malfacilan demandon, kiujn lingvojn oni devus studi en la irlandaj lernejoj, kie la franca tradicie superregadis, pro tio, ke la plej parolata fremdlingvo en Irlando nun estas … la pola!

En la Eŭropa Tago de la Lingvoj 2007 EU-Komisionano Leonard ORBAN substrekis la centran gravecon de motivado por sukcesa lingvolernado. Ĉi-kuntekste, ŝajnas, ke la lernfaciliga aliro meritas seriozan konsideron.

Pliaj detaloj ĉe: www.seanoriain.eu
Aperis en Eŭropa Bulteno, januaro 2008, № 1 (66)

---

[24] www.springboard2languages.org [*vd. la grafikaĵon – NdlR*]

[25] Konferenco pri edukado la 12-an de septembro 2006. Vidu www.cnag.ie por la plena irlandlingva teksto, kun anglalingva resumo.

Lernejana malbonfarto

de **Raita PYHÄLÄ**, *magistro, emerita lingvoinstruistino (Finnlando)*

En novembro 2007 en finna lernejo de 13-19-jaruloj okazis tragedio, kiu skuis ne nur Finnlandon, sed la mondon. 18-jarulo mortpafis la lernej-estrinon, flegistinon, ses lernejanojn kaj sin mem. Homoj ekdemandis, kial kelkaj gejunuloj tiel malbone fartas, ke ili ribelas per tia perforto. Signojn pri la mensa malbonfarto de la pafinto videblis en la interreto jam en junio kaj pri ili avertis usona retano, sed neniu reagis al lia averto.

Kio igis la 18-jarulon murdisto?

Unuj diras, ke li freneziĝis kaj, ke la tragedio estis hazarda. Aliaj proponas diversajn kialojn:

- li estis soleca junulo ĉikanita kiam li estis knabeto;
- li fermis sin en la mondon de komputila komunikado kaj perdis la senton pri realaĵoj;
- li konatiĝis kun danĝeraj filozofiaj kaj politikaj ideologioj;
- li konsideris sin superhomo, kiu ribelu kontraŭ la konvencia mondo kaj forigu la senvalorulojn;
- vere troveblas multaj malbonaĵoj, kiuj igas junan homon senespera;
- kuracisto malsaĝe priskribis medikamenton kontraŭ deprimiĝo kaj poste ne kontrolis, ĉu la junulo uzas ĝin aŭ ne.

Kiajn ajn kialojn oni proponas, UNU distingiĝas. La junulo ne kutimis interparoli, provadi kaj kompari siajn ideojn kun proksimuloj, kiuj povus gvidi kaj helpi lin. La sekvoj de lia soleca evoluo en danĝera kaj malsana direkto influos liajn samlernejanojn, instruistojn kaj la familianojn de ili ĉiuj dum jaroj, eble ĉiam. Malgraŭ psikologa kaj alia helpo multaj personoj daŭre suferas en la lernejo de la tragedio, dum en kelkaj aliaj lernejoj fiŝercemuloj, ne komprenante la seriozecon de la afero, minacas per simila perforto, kaŭzas malfacilaĵojn al la polico, sia familio kaj punon al si mem.

Ĉu ni E-instruistoj povas helpi, ke neniu el niaj klubanoj/lernantoj fariĝu ĝenanto kaj ribelanto? Ĉu ni povas influi la atmosferon de la tuta lernejo?

Jen kelkaj kaŭzoj por malbonfarto, kiujn ni pripensu:

- Konkursoj, kie nur la 1-3 venkintoj estas laŭdataj, detruas la memfidon kaj ĝojon de la aliaj partoprenintoj.
- Ankaŭ korpaj punoj detruas memfidon de la punitoj kaj agresivigas ilin. El la 47 Eŭrop-Uniaj landoj 18 jam malpermesis korpan punadon.
- Dum paŭzoj la lernantoj malstreĉiĝu; kaj infanoj kaj plenkreskuloj bezonas moviĝon kaj ne tro longe restu sidantaj. Ofte en lernejoj mankas loko kaj iloj por ludema sportado kaj malstreĉiĝo. Ni provu elpensi refreŝigajn defiojn.
- Pupitroj, tabloj kaj seĝoj ne laŭas la kreskadon de la lernantoj. En la lernoĉambro oni bezonas sidlokojn por diversgrandaj geknaboj. Jam kelkaj 15-jaruloj altas 180-190 centimetrojn, dum aliaj 150. Ni provu aranĝi taŭgan lokon al ĉiu.
- Lernanto malinteresiĝas, se instruisto ne scias helpi lin lerni aŭ ne havas tempon por tio. Bonŝance niaj grupoj malofte tro grandas. Rimarku, kiu bezonas pli da gvidado kaj pli simplajn taskojn.
- Ankaŭ se lernanto ne trovas la lernotaĵojn lernindaj aŭ se li jam scias ilin, li kompreneble bezonas individuan atenton kaj pli mal-facilajn taskojn por progresi. Meznivele rapida instruado ne taŭgas al ĉiuj. Kiel doni lernotaskojn laŭ la kapabloj de la lernanto?
- Se ni ne sukcesas interesi kaj laborigi niajn lernogrupojn, ni mem frustriĝas, laciĝas kaj ĉesas fari nian plejbonon . Ni komencas vidi nian lernogrupon kiel malagrablan amason regendan per forto. Pli bone se ni povus kunlabori kun ili kiel kamaradoj kaj niaj rilatoj estu respektemaj kaj ne tro rigidaj.

Plej grave estas, ke en la lernejo ĉiu trovu amikon. Neniu restu sola kun siaj problemoj. Oni lernu interparoli, aŭskulti kaj kompreni la vidpunkton de alia ulo. Niaj infanoj kaj gejunuloj ne izoliĝu en virtuala mondo ne komprenema pri homamo kaj ĉiutaga kunvivado.



Dialektiko en matematiko

de **Bardhyl SELIMI** (Albanio)

Dialektiko estas komprenata kiel arto de la logika rezonado, la ĉerpado de konkludoj rezonante logike, uzante la kontraŭdirojn en la pensado, arto de logikaj diskursoj ktp. La praa *HERAKLITO* diris, ke „oni ne povas enakviĝi en la sama akvo de la rivero ĉar ĝi moviĝas senĉese". *PLATONO* aldonis, ke „ĉio fluas konstante, sendependе de la imagoj kreataj de niaj sensoj". *SOKRATO* malkovris la verojn pere de demandoj al asertoj plenaj de kontraŭdiraĵoj, kiujn li starigis al la kunkonversaciantoj.

Hodiaŭ dialektiko komprenatas kiel la tuto de la principoj de la pensado kaj rezonado resumeblaj jene:

- Leĝo de kontraŭdira karaktero de ĉiu objekto aŭ fenomeno.
- Leĝo de senĉesa moviĝo kaj ŝanĝiĝo de ĉio enmonde.
- Leĝo de neado de la neado.
- Leĝo de transpaso de kvanto al kvalito
- Leĝo de progresiva evoluo en formo de spiralo.

Dialektiko estas sendube ia potenca ĝeneraligo de la ordinara formala logiko posedata de homoj kaj uzata dum ĉiutagaj rezonadoj, kie okulfrapas parte la leĝo de ekskludenda trio, kio signifas, ke inter du kontraŭaj eldiroj pri la sama objekto kaj sama loko nur unu estas ja vera, dum la alia estas malvera. Ekz.: „Mi estas hejme" kaj „Mi ne estas hejme". Certe nur unu el ĉi tiuj eldiroj estas vera.

Sed la formala logiko estas malforta por solvi eksterordinarajn situaciojn kie povas interveni la homo. Tial iu filozofo diris, ke „la formala logiko similas al tiu ĉasta sinjorino ene de la kortomuroj de sia hejmo, kiu ĵus transpasinte tiujn murojn envolviĝas en la plej strangaj kaj surprizaj aventuroj".

Ni ilustru ĉi tion per la ekzemplo cirkulanta en la studentaj rondoj: „Dum iu pluvŝtorma tago juna viro veturis per sia malgranda, dusidloka aŭto. Ie for de la urbo, ĉe busstacio sur la stratorando, li rimarkis tri personojn: unu ŝajne tre malsanan maljunulinon, unu medicinistoп, kiu iam savis al li la vivon kaj unu belan modelulinon. Kiun el tiuj tri li invitos en sian aŭton?"

La formala logiko kondukus lian penson al la analizo de ĉiu persono aparte, laŭ kiu indus inviti kaj la maljunulinon evidente tre malsanan pro humanismaj kialoj, kaj la medicinistoп pro moralaj kialoj, kaj


ankaŭ la belulinon, pro spiritaj kialoj. Sed kion ja faris la viro en ĉi tiu eksterordinara situacio? Li elaŭtiĝis kaj enmanigis la ŝlosilojn al la medicinisto petante lin kunvojaĝi kun la maljunulino, dum li mem restis ĉe la busstacio kun la belulino atendante la sekvan buson.

La popolo delonge estas malkovrinta la dialektikon de la vivo, kio estas esprimita jam en ĝiaj proverboj kaj saĝaj vortoj. Ni menciu ekz. Nastradinon kiu ĉiufoje, kiam li malsupreniris la ŝtuparon, ploris ĉar li rememoris, ke li devos denove supreniri ilin.

Ĉu dialektiko speguliĝas en matematiko? Certe jes.

En la matematiko, komencante de la elementa, oni renkontas konceptojn kaj operaciojn tute kontraŭajn, kiel pluso kaj minuso, multipliko kaj divido, potencigo kaj radikiĝo, eksponencialo kaj logaritmo, diferencialado aŭ derivado kaj integralado.

Ofte oni renkontas tiel nomatajn paradoksaĵojn ankaŭ en matematiko. Ni rigardu ekzemple la apudan figuron. Oni povas atingi *B* de *A* laŭ pluraj vojoj, interalie laŭ arko de duoncirklo je diametro *AB* aŭ laŭ tiuj sinsekvaj arketoj same duoncirklaj sed je diametroj je duono, kvarono, okono ktp de *AB*. Kiu vojo pli longas? Kelkaj povas aserti, ke pli mallongas la unua vojo, kio ne veras.



Se ni plenumas sinsekve du kontraŭajn operaciojn, ni akiros la unuan esprimaĵon. Ekz.:

– $\sqrt{a^2}=a$ por $a>0$, do la elradikiĝo de kvadrato donas *a* mem;

– inverse $(\sqrt{a})^2=a$, do la dua potenco de la radiko donas *a* mem;

– la produkto de du negativaj nombroj donas pozitivan nombron:

$$(-)*(-)=(+).$$

– la inverso de inverso donas la nombron mem:

$$1/(1/a)=a;$$

– logaritmo je bazo *a* de la potenco *x* donas *x* mem:

$$\log_a a^x = x;$$

– la potenco de logaritmo surbaze de *a* de *x* donas *x* mem:

$$a^{\log_a x} = x$$

– la diferencialo de integralo de *f(x)* donas *f(x)*:

$$d\int f(x)dx = f(x);$$

– la integralo de diferencialo de *f(x)* donas denove *f(x)*:

$$\int d(fx) = f(x).$$


La supre menciitaj ekzemploj atestas ja pri la apliko de la leĝo de neado de la neado.

La historio de la evoluo de la matematika penso fakte estas ja historio de la dialektika evoluo de konceptoj, metodoj, teorioj ekde antikveco ĝis nuntempo. Se la tiel nomata elementa matematiko, de konstantaj grandoj spegulis pli-malpli la moviĝon kaj la ŝanĝiĝon, la matematiko de la lastaj tri jarcentoj, la kalkulo aŭ diferenciala kaj integrala kalkuloj formiĝintaj danke al Njutono kaj Lejbnico spegulis ĝin plene kaj adekvate. La ideo de variablo dependa kaj sendependa (funkcio) eniris vaste en matematikon kaj trovis poste sennombrajn aplikojn en la aliaj natursciencoj kaj en la teĥniko. La koncepto de derivaĵo kiel rapideco de ŝanĝiĝo de la funkcio dependе de argumento spegulas ja ĝuste tiun dialektikon de la aĵoj. Samtiel la konceptoj de infinitezimo, limeso ks.

Ankaŭ en matematiko la konceptoj havas sian historion de naskiĝo, evoluo kaj perfektiĝo, ĝeneraliĝo. Ni prenu ekzemple la nombron:


Je komenco ĝi esprimis la komunan kvantecan karakterizaĵon de aroj kiuj povus interrespondi inter si. Ni diru, ĉiuj aroj enhavantaj tiom da elementoj kiom da fingroj estas sur la mano, karakteriziĝas de la nombro kvin; tiuj, kiuj interrespondas kun la piedoj de la hundo karakteriziĝas de la nombro kvar, ktp. Estiĝis tiamaniere la unua nombraro, la *numeroj naturaj* 1, 2, 3,…

La divido de aĵoj en partoj helpis al la ideo de *frakcioj*. Poste oni komprenis, ke devas ekzisti ankaŭ alispecaj nombroj malpli konkretaj kiel la negativaj kaj nulo inter ambaŭ aroj. La *negativaj nombroj* interpretiĝis kiel ŝuldoj kontraŭ riĉaĵoj, perdoj kontraŭ profitoj ktp. La nova nombraro nomiĝis *racia*. Kiam matematikistoj renkontiĝis kun la rilato de diagonalo de kvadrato al ties eĝo, ili ekkomprenis, ke temas jam ne pri iu frakcio, tiuj segmentoj ne povus kunmezuriĝi, tio



La unua iracia nombro

estas, ne estus eble prezenti la longon de diagonalo kiel finia aŭ nefinia decimala nombro de formo 3,4155555 aŭ 3,256 ks.



La evoluo de la koncepto de nombro

Tial ili eknomis la novan nombron malracia kaj la novan aron *malracia aro* kiu rezultis notinde pli granda ol la racia mem kaj plenigis kune kun la raciaj komplete la nombroakson. Ĝi nomiĝis *reela aro*.

Plue, la aro de ordigitaj reelaj paroj formas la aron de *kompleksaj nombroj* je formo *a +b i* kiu reprezentas pluan ĝeneraliĝon de reelaj nombroj. Tiu ĉi proceso kontinuas ankoraŭ hodiaŭ per ĉiam novaj aroj kaj montras la progresivan evoluon de unu ĉeno de spiralo al alia pli alta.

Nature oni atendis por la novaj nombraroj, ke ili konservu la ecojn de antaŭaj, sed ekhavu ankaŭ novajn ecojn, esprimante tiel la transpason de kvantaj ŝanĝiĝoj al kvalitaj. Tiel, por la naturaj nombroj ne ĉiam havas signifon la rezulto de subtraho, ĉar ekz. 7-10 ne donas naturan nombron, kio ne okazas ja en la aro de *entjeraj nombroj Z* kaj en la plej superaj aroj. Por la entjera nombraro ne ĉiam havas signifon la operacio de divido, ĉar ekz. *7/10* ne estas entjero, dume tio estas normala por la aro de frakciaj nombroj aŭ racia nombraro.

La elradikiĝo ne ĉiam havas signifon en la aro de reelaj nombroj ĉar ekz. la dua radiko de minus unu ne estas reelo, sed ĝi estas ja kompleksa nombro. Samtiel, se ni esploras la dekomencan koncepton de la aro. La *finiaj aroj* akceptas la leĝojn de aritmetiko, kiel ekz. la leĝon de interŝanĝo de pozicioj $A+B=B+A$ kaj $A+B>A$ aŭ $A+B<A$, dum por *nefiniaj aroj* oni konstatas ankaŭ kvalite novajn leĝojn. Ekz. en ili povas esti $A+B=A$. Ni prenu la aron de numeroj (naturaj nombroj) kaj aron de paraj numeroj. Ili ambaŭ entenas senfine da elementoj, tamen ili ne povas submetiĝi al la rilatoj $A>B$ aŭ $A<B$, kontraŭe por ili validas la rilato $A+B=A$ ĉar ĉiu para nombro estas samtempe ankaŭ natura nombro.

Similaj konkludoj povas akiriĝi se ni komparas la finiajn seriojn kun tiuj de nefiniaj. Por ili oni ne ĉiam povas apliki la leĝojn konstatitajn por finiaj kaj *konverĝaj serioj*, tio estas ekz. oni ne povas ilin derivi aŭ integri po unuopaj termoj. Aŭ ili povas rezultigi post adicio ne ĉiam difinitajn seriojn, ĉar okazas, ke la sumo de du nefiniaj serioj povas rezultigi iam konverĝan iam ne konverĝan seriojn:

$$\sum_{1}^{\infty} 1/n \; - \sum_{1}^{\infty} 1/n = 0 \text{ aŭ diverĝan } \sum_{1}^{\infty} 1/n + \sum_{1}^{00} 1/2n$$

El la landoj kaj sekcioj…

Argentino

Argentina E-Ligo informas, ke la nova *Argentina Esperanto-Lernejo,* kreita de la Ligo, estas oficiale aprobita ĉe la ŝtataj juraj instancoj. La Argentina E-movado havas nun oficialan lernejon jure establitan por instruado de la lingvo internacia akorde al la landaj leĝoj kaj povas ricevi financajn subvenciojn. La E-Lernejo nun devos klopodi atingi alian revon: enkonduki E-on en ŝtatajn lernejojn. Argentina E-Ligo en venonta asembleo proponos regularon por la funkciado de la Lernejo.



René ARCE [*surfote*], membro de la estraro de AEL, estas instruisto en publika lernejo de la provinco Kordobo. Tie en lernejo de la vilaĝo “El Saladito”, li jam komencis instrui E-on al gelernantoj.

Belgio

La 13-an de marto 2008 okazis en liceo Martin V en Louvain-La-Neuve la ĉiujara tago „*Festivalo: ĉiuj kune”*. En ĝi partoprenis ankaŭ la asocio *Kvinfolio* kun budo (gvide de *Jean ANNET*) kaj tri prelegoj pri E-o.
Françoise PELLEGRIN klarigis kio estas E-o kaj kial oni lernu ĝin. Ŝi gvidis etan E-kurson, kaj fine ĉiuj partoprenantoj ekkantis entuziasme.
Prelegis ankaŭ *Michel FEYS*, mezlerneja instruisto pri fiziko, kaj instruisto de Esperanto en la lernejo Freinet de Bruyères LLN.
Entute 75 gejunuloj partoprenis la prezentadon pri E-o kaj inter ili 20 ŝatus sekvi E-kurson. Unu el la partoprenantoj, kies okuloj estis akrebrilantaj, demandis: „Sinjorino, ekde kiu aĝo oni povas lerni E-on?”

laŭ informoj de Joelle CORROY

Bulgario

Plene sukcesis la **sesa laborrenkontiĝo de la projekto Socrates Comenius 2 AKEL** (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj), kiu okazis en Bulgario de la 4-a ĝis la 11-a de aprilo 2008.
Kune kun la bulgaraj lernantoj kaj instruistoj de la ŝtata lernejo “Tsanko Tserkovski” de Polski Trambesh, en la regiono Veliko Tarnovo, estis la brita delegacio (6 studentoj kaj 2 geinstruistoj) de “Sir Thomas Rich’s School” de Gloucester, la hispana delegacio (2 gelernantoj kaj 2 instruistinoj) de la mezlernejo “IES Reyes Catòlicos” de Ejea de los Caballeros (Zaragozo) kaj la itala delegacio (6 gelernantoj, 3 instruistoj kaj 2 helpantoj) de nia ŝtata mezlernejo “C.Cavour” de Modeno.

La temoj de la laborrenkontiĝo estis:

1) "Unuiĝinta Eŭropo: egalaj rajtoj por la diversaj eŭropanoj” laŭ La Ĉarto de la fundamentaj rajtoj de Eŭrop-Unio, proklamita en Nico la 7-an de decembro 2000, sintezo de la valoroj kiujn akceptas ĉiuj membroŝtatoj de Eŭropa Unio. Necesas fortigi la defendon de la fundamentoj rajtoj ĉe la lumo de la evoluo de la socio, de la socia progreso kaj de la sciencaj kaj teknologiaj disvolvoj

2) „2008a: jaro de la interkultura dialogo".

3) “Nia trijara internacia kunlaboro: belaj spertoj, konsideroj kaj kritikaj pensoj pri malfacilaĵoj en la realigado de nia laborprogramo”.

Ni estas finpretigantaj nian konversacian libreton kiu enhavas versiojn en la bulgara, angla, hispana, itala kaj Esperanta lingvoj. Aparta spaco estas rezervita ankaŭ por la lingvo de la signoj.
Agrablajn horojn ni pasigis kune kun la bulgaraj samideanoj, kiuj multnombre renkontis nin en Plovdiv, en Polski Trambesh kaj en Sofio. Je mia peto akcepti la defion testi siajn lingvokonojn, pluraj el ili dediĉis kelkajn horojn al la testado de la novaj ekzamentekstoj de UEA-ILEI, kiuj alprenas la normojn de la Komuna Eŭropa Referenckadro pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj. En la testado partoprenis ankaŭ la geinstruistoj de niaj naciaj AKEL-teamoj atingante tre kontentigan poentaron. Bedaŭrinde en Sofio ne eblis viziti la lernejon por surdaj infanoj, ĉar ili havis jam alian programon.
Post tiuj ĉi belegaj spertoj en internacia kunlaborado ni esperas, ke estos oficiale akceptotaj du aliaj similaj projektoj: “Interkultura kaj multlingva dialogo inter eŭropaj lernejoj” kaj “Junaj civitanoj de la planedo Tero”.
Nia kolegino s-ino Mariana GENCHEVA, la kunordiganto de ambaŭ projektoj, kaj ni ĉiuj deziras forte, ke la amikaj rilatoj, kiuj estiĝis pere de la AKEL-projekto, daŭru kaj plifortiĝu favore al pli pacama mondo.

Luigia OBERRAUCH, kune kun la itala teamo

Ĉinio

La eŭropaj lingvoj estas malfacilaj por ĉinoj. Pro tio ĉi-semestre, la Elementa lernejo Baiyangshu en Taiyuan-urbo de Ĉinio okazigis eksperimenton, kiu prenas E-on kiel gvidan lingvon en la lernado de fremdaj lingvoj. La E-instruado jam komenciĝis en la unua klaso kun pli ol cent (!) infanoj kaj kun du lernohoroj ĉiusemajne. Eĉ ankaŭ kelkaj gepatroj promesis lerni E-on kun siaj infanoj. La lernejo planas, ke la infanoj lernos E-on ĝis la tria aŭ kvara klaso, sed laŭ la ŝtata programo oni kutime eklernas la anglan en la tria klaso. Do la infanoj devos lerni samtempe kaj E-on kaj la anglan dum unu aŭ du jaroj. La lernejoestro Wei Yubin estas esperantisto. Li volis okazigi E-kurson en sia lernejo delonge, sed pro manko de instruistoj tio ne efektiviĝis.



Antaŭ du jaroj li ekedukis E-instruistojn kaj du instruistinoj sukcese ellernis la lingvon kaj ludas gravan rolon en la instrua eksperimento. La lernejo deziras kontaktiĝi kaj korespondi kun alilandaj elementaj lernejoj, kiuj funkciigas E-kurson.

La adreso: *Wei Yubin, Baiyangshujie- Xiaoxue Taiyuan, Shanxi, CN-030003, Ĉinio*. Retadreso: <*jado.wei@gmail.com*>

Germanio

Lerneja kaj eksterlerneja E-instruado en Herzberg – la E-urbo

Baza nivelo: en du elementaj lernejoj trideko da infanoj lernas E-on, flegas kontaktojn kun partnerlernejoj en Pollando kaj Britio. Estas planataj eĉ partopreno en Comenius-projekto kaj interŝanĝaj vizitoj.

Meza nivelo: kaj en la loka gimnazio kaj en la t.n. meza lernejo estas instruata E-o en 3 lernejaj grupoj. La kursanoj partoprenos en somero internaciajn renkontiĝojn: al Pollando, al la komuna somera feriumado (SALO-3) de la ĝemelurbanoj veturos 10 gejunuloj, en la Infana Kongreseto en Nederlando ĉeestos 2 knabinoj el la 5-a klaso.

Konversacia rondo: en la merkreda E-kurso kunlernas grupeto de lokaj interesiĝantoj, kiuj post la kurshoroj ĝojas pri kunesto en leĝera kluba etoso. Krom la regula lingvokurso okazas ankaŭ neregule anoncitaj semajnfinaj intensaj kursoj en diversaj paralelaj grupoj de komencantoj ĝis konversacia nivelo.



s-ro Uwe Joachim MORITZ kun grupo de seminarianoj

Supera nivelo: la *Studsesioj* donas al lernemuloj bonan ŝancon por klerigado, pluklerigado. La semajnfinaj respektive unusemajnaj sesioj enhavas variajn temojn kaj zorgas pri fak-scioj en gramatiko, lingvistiko, interlingvistiko, literaturo, historio, movadaj konoj. Ekzemple en februaro 2008 Uwe Joachim MORITZ instruis en prelegserio pri *Aspektoj de la problemoj de etnaj minoritatoj en Eŭropo*, en decembro 2007 kaj aprilo 2008 en du sesioj D-ro sc. Detlev BLANKE estis la gastpreleganto pri interlingvistiko.

Hungario

Pedagogia Tago kaj laborkunvenoj de ILEI-estraro en Budapeŝto

La 24-a Pedagogia Tago okazis en ITK (Fremdlingva Pliperfektiga Centro), kie eblas ekzameniĝi nun pri 22 diversaj lingvoj, interalie pri E-o en tri niveloj (B1, B2, C1).

Vendredon antaŭ la Pedagogia Tago la estraro de ILEI havis priparoladon [*vd. la foton sube!*] kun la direktorino de ITK GÁBORJÁN Lászlóné kaj la vicdirektoro SZABÓ László pri la antaŭpreparata unulingva Esperanta ekzameno, kiun ILEI-UEA kaj ITK komune ellaboras.



De maldekstre: Aida ČIŽIKAITĖ, Mihai TRIFOI. Sjoerd BOSGA, Lászlóné GÁBORJÁN, László SZABÓ, Zsófia KÓRÓDY, Atilio ORELLANA ROJAS

Sabaton kvindeko da E-instruantoj havis pliperfektigan trejnadon en tiu ĉi instituto. Komence Pálma CSISZÁR-SALOMON informis pri la statistikoj rilataj al la E-lingvaj ekzamenoj en ITK. Ekde 2002 ĉiujare pli-malpli 6000 ekzamenoj okazas en la instituto pri Esperanto. La sumon oni nepre duonigu, ĉar la buŝa kaj la skriba ekzameno kalkuliĝas aparte. Estas personoj, kiuj jare plurfoje provas ekzameniĝi, se la unuan fojon ili malsukcesis, do oni povas diri, ke pli-malpli 2500 pesonoj ekzameniĝas pri E-o jare en la Fremdlingva Perfektiga Centro. La pliparto de la kandidatoj rolas kontentige en la buŝa ekzameno, sed la sukcesoprocento en la skriba parto meznivele estas nur ĉ. 40%-oj. La statistikoj montras, ke la lernantoj havas problemojn pri la traduko el la hungara al E-o, pri la testo, kaj surprize ankaŭ pri la tekstokompreno. Specimeno pri la ekzameno troveblas en la hejmpaĝo de edukado.net, kaj nun jam ankaŭ sur la hejmpaĝo de ITK (*http://www.itk.hu/vanyagok /eszperanto/index.htm*).

Post la prezento de la statistikoj la ĉeestantoj komune korektis solvojn de la februara ekzamena traduktasko, kaj de la tekstokompreno helpe de Zsuzsa TÖTÖSNÉ GADOS. La kunlaborantoj de ITK klopodis klarigi la postulojn kaj la uzatan korektmanieron. Post la asembleo de ILEI-HU, la partoprenantoj pridiskutis en grupoj kiel eblus prepari la lernantojn pli efike al la taskoj, kiuj estas laŭ la statistikoj malfacilaj por ili.



Dum la posttagmezo Ludoviko MOLNÁR prezentis la projekton „Lingvolanĉilo” [*vd. la foton*], kies celo estas almenaŭ eksperimente enkonduki E-on en plejeble multajn bazlernejojn por plifaciligi la lernadon de aliaj fremdlingvoj.
Momente en Hungario en kvin bazlernejoj oni instruas E-on, kaj oficiale nur en unu mezlernejo, kvankam ankaŭ abiturientiĝi eblas pri E-o en Hungario.

Post tio Veronika HÉE prezentis interesan prelegon pri la planita nova eldono de la hungara-esperanta vortaro, redaktita de Alfonz PECHAN.

Fine de nia programo alvenis la estraro de ILEI, kiu havis liberan interparoladon kun la ĉeestantoj. Zsófia KÓRÓDY, vicprezidantino prezentis la nove eldonitan E-lingvan tradukon de Komuna Eŭropa Referenckadro, kiu estas tre utila en la laboro de la ekzamenantoj kaj instruantoj de E-o.



Antaŭ kunsido en Budapeŝto (de maldekstre): Atilio ORELLANA ROJAS, Barbara PIETRZAK (UEA), József NÉMETH (IPR), Sjoerd BOSGA, Aida ČIŽIKAITĖ, Zsófia KÓRÓDY, Mihai TRIFOI, Gregor HINKER (TEJO)

Ŝi informis la publikon ankaŭ pri la ellaborata unulingva E-ekzameno. Tamen la celpubliko de la ILEI-ITK-ekzameno ne estas ĉefe la hungaroj, sed ĉiuj eksterlandaj E-lernantoj. Ĝuste pro tio mankos el tiu ekzameno la tradukekzerco, kio estas la plej granda diferenco kompare kun la nuna dulingva ekzameno de ITK. (Pliaj informoj pri Pedagogiaj Tagoj en la hejmpaĝo de ILEI: *www.ilei.info*).

Pálma CSISZÁR-SALOMON, estrarano de ILEI-HU

Pollando

La E-klubo „Verdaj Papilietoj" en Gubin havas novan paĝaron, kie ili prezentas sian lernejan agadon. Ili komencis kunlaboron kun alilandaj partneroj el Hispanio, Portugalio, Rumanio kaj Ukrainio, evidente en E-o. La leteroj tien kaj reen jam flugas, poste, iam, la infanoj esperas renkontiĝi kaj paroli Esperante. Adreso: *http://akelpollando.blogspot.com*

laŭ informoj de Krystyna WOROBIEJ

Svedio

23-a internacia somera E-kurso, 6-13 julio 2008 en Lesjöfors

La kursoj komencis sian ekziston en la jaro 1986 en Popola altlernejo de Karlskoga. Pli poste oni translokis ilin al la E-kursejo en Esperanto-Gården, Lesjöfors. Ĝi situas en arbara, lagoriĉa provinco Vermlando. La instruado okazas nun en tri niveloj: komencantoj, progresantoj kaj parolantoj. Krom tio oni havas infanan grupon. Tio donas bonegan eblecon al gepatroj aŭ geavoj pasigi unu semajnon kune kun sia juna generacio. Plenkreskuloj en la familio povas mem partopreni la dumtagan lernadon aŭ esti kun siaj infanoj. Ekzistas riĉaj ebloj por promenado, biciklado, fiŝkaptado, legado ktp.

Adreso: *Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, SE-68096 Lesjöfors, <egarden@esperanto.se>*

Venezuelo

Konturiĝas faka kunagado inter la Hungara E-Asocio kaj iniciatantoj el Venezuelo (kaj Hispanio) por enkonduki E-instruadon en (baz)lernejoj en Venezuelo. En la nuna fazo oni komparas la jurajn cirkonstancojn de tiuj du landoj, poste sekvos la faka preparo de instruprogramo kaj serĉado de altkvalifikitaj E-instruistoj. La iniciato estas ankoraŭ en organiza fazo, do oni serĉas personojn, kiuj partoprenos en la faka laborgrupo. Bv. sendi sciigon pri via emo partopreni en la projekto al la retadreso <*mesz@eszperanto.info*> kune kun la priskribo de via fakpreteco.

laŭ Ladislao SZŐKE, ĵurnalisto, oficejestro de HEA

Por via notlibro…

Renkontiĝo de Lernu! en Slovakio

E@I kaj lernu-teamo informas, ke ĉi-somere okazos la unua renkontiĝo de Lernu! - uzantoj, helpantoj kaj kreantoj.

Datoj kaj loko: 9-a ĝis 17-a de aŭgusto, en la urbeto Modra, nur 30 km-ojn de la ĉefurbo Bratislava. Detaloj: *http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj /SES/ index.php*

Peter BALÁŽ, E@I-kunordiganto, <petro@ikso.net>

TORPEDo-4 (2-5 oktobro 2008 en Herzberg am Harz)

1. Cseh-metodo en la 21-a jarcento – Fakkunveno de Cseh-instruistoj kaj interesatoj

Partoprenkotizo: de 35 EUR ĝis 45 EUR (depende de via aliĝdato). AGEI, landa sekcio de ILEI en Germanio invitas Cseh-instruistojn el Germanio kaj el la tuta mondo al sia tradicia Oktobra Pedagogia Renkontiĝo organizata de Interkultura Centro Herzberg (ICH)/Germana E-Centro inter 2-5 oktobro 2008.

Anoncu vian prelegtemon, prelegantoj ricevos rabaton.

Tiu kunveno estos grava kaj por spertaj Cseh-instruistoj kaj por tiuj, kiuj ŝatus ekkoni pli pri efika instruado de E-o: ĝi donos bonan ŝancon por spertinterŝanĝo, serĉado de taŭgaj instrumetodoj por la 21-a jarcentro kaj helpos nian fakan pliboniĝon.

Programo: prezentado de uzataj materialoj, instruteknikoj, diskutoj.

2. E-instrumaterialoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro

D-ro Rudolf Fischer, prezidanto de GEA, vicprezidanto de AGEI gvidos laborgrupon por analizi lernolibrojn kaj ellabori rekomendojn al uzataj, akireblaj lernolibroj laŭ KER. Venu kaj ni faru kune!

Kunlaborantoj ricevos rabaton.

3. E-o en la lernejo kaj lernejaj projektoj

Zsófia KÓRÓDY gvidos laborgrupon por trarigardi, kiajn rezultojn ni havas kaj kiujn ŝancojn, kiun strategion ni povas havi por institucia instruado de E-o. Kiel ni povas per nacia, internacia kunlaboro fortigi la pozicion de E-o en la instrusistemo? Spertoj, kunordigo de laboro, novaj ideoj, strategiaj paŝoj? *Venu kaj aktive partoprenu!*

La tutjara programo de ICH enhavas ankaŭ en 2008 praktikajn trejnsesiojn (kaj semajnfinajn kaj tutsemajnajn). Krom la bazaj fakoj por la klerigado kaj pluklerigado (gramatiko, literaturo, historio, interlingvistiko) estas en la ofertolisto kursoj por la evoluigo de praktikaj konoj, kiel ekz. varbado, organizado, ktp. Programkalendaro: *http://ic-herzberg.de*, menupunkto *Kursoj/Studsesioj*. Aliĝo: *Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6*, aŭ rete: *<esperanto-zentrum@web.de>* *Zsófia KÓRÓDY*

Fota kaj filma invitoj al Benino

Oni povas trovi retan fotoalbumon el Porto-Novo (kie Songhai-Centro gastigos nian 41-an konferencon) ĉe la adreso: *http://www.ipernity.com/doc/43336/album/57244*. La fotojn faris kaj disponigas Zsófia KÓRÓDY, gvidinto de la ILEI-seminario tie en 2007. Kaj jen filmo, kie la partoprenintoj de la seminario sendas sian mesaĝon al vi kaj tutkore invitas vin: *http://ileiweb.extra.hu/*

La seminario en Porto-Novo en 2007 estis antaŭpreparo por nia ĉi-jara konferenco. Vidinte la filmeton vi verŝajne konsciiĝos, kiom grava estas tiu internacia faka renkontiĝo por niaj afrikaj gekolegoj, kaj ni esperas, ke por multaj el vi la partopreno en la konferenco en Afriko estos neforgesebla travivaĵo. Akceptu la inviton kaj partoprenu en la ILEI-konferenco aŭ/kaj subvenciu la partoprenon de afrikaj gekolegoj.

Internacia konferenco pri lingvotestado

La Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo (ALTE) en ĉiu tria jaro organizas sian grandan konferencon. En 2008 ĝi okazis en Cambridge, Britio inter la10-a kaj la 12-a de aprilo kun partopreno de ĉ. 600 delegitoj kaj respondeculoj pri lingvotestado, kiuj venis el 50 landoj, el ĉiuj kontinentoj kaj reprezentis 300 instituciojn: edukministeriojn, universitatojn, klerig- kaj pluklerigcentrojn, lingvolernejojn ktp. La ĉeftemo estis la socia kaj eduka influoj de la lingvotaksado. Unueciĝo en Eŭropo implicas unueciĝon en la eduk- kaj ekzamensistemoj, kaj tio influas ankaŭ aliajn landojn, de kie venas elmigrintoj aŭ studentoj al Eŭropo. Krom la ĉefprelegoj ĉiutage eblis elekti el 11 paralele okazantaj 45-minutaj prelegoj en 4 blokoj, en la paŭzoj kaj dum la oficiala akcepto estis ebleco por personaj interparoloj, sinprezentado kaj interŝanĝo de opinioj kaj spertoj.

UEA kaj ILEI estis reprezentataj per la E-lingva traduko de la *Komuna Eŭropa Referenckadro* (KER), kiu kuŝis sur la breto de la ekspozicia ĉambreto inter aliaj faklibroj pri lingvotestado, kaj per la ĉeesto de Zsófia KÓRÓDY, vicprezidanto de ILEI. La konferenco donis bonan ŝancon ankaŭ al spertiĝo en internacia faka medio, kaj por ekscii pli multe pri la laboro de ALTE kaj samtempe montri, ke ankaŭ E-o estas vaste uzata vivanta lingvo. Dum la personaj interparoladoj eblis sperti, ke ekstereŭropanoj, delegitoj de malgrandaj landoj ekz. el Ĉilio, Kipro, reprezentantoj de malgrandaj lingvoj estas pli malfermitaj al lingvaj, lingvopolitikaj demandoj, al la

ĉiutagaj problemoj de internacia komunikado. La sekva, 4-a granda konferenco de ALTE okazos post tri jaroj, en 2011, en la Jagielona Universitato en Krakovo, Pollando.
Jen alia organizaĵo, alia konferenco rilate al lingvaj ekzamenoj, lingvotestado, rekomendata al fakaj interesiĝantoj: *http://www.iaea.info/* (*The International Association for Educational Assessment*), konferenco inter la 7-a kaj la 12-a de septembro 2008, Cambridge.

Zsófia KÓRÓDY



Asembleo de ILEI-HU la 8-an de marto 2008. Meze: Pálma CSISZÁR-SALOMON, la ĉeforganizanto de la 24-a Pedagogia Tago en Budapeŝto

Forumo

Kiel vi scias, ekzistas pluraj metodoj de lernado (instruado) de E-o. Mi volas rakonti al vi pri tre interesa kaj perspektiva metodo de lernado de E-o. Fakte tiu metodo estas aplikebla al lernado de ajna lingvo kaj donas BONEGAJN rezultojn. Mi mem uzis ĝin, kiam mi estis komencanto kaj povas aserti, ke ĝi BONEGE funkcias. La metodo estas kiom facila, tiom malfacila. Facila ĝi estas, ĉar oni bezonas NUR ellerni alfabeton kaj ekscii regulojn de legado. Tio estas sufiĉe facile kaj rapide efektivigebla. Kaj

poste oni devas nur preni iun libron, verkitan en bona E-o (mi rekomendus librojn de la hungara verkisto Nemere) kaj laŭtlegi ĝin. NUR laŭtlegi. Sed! Ĝisfine kaj plurfoje!!! Tre grava kondiĉo – NE UZI VORTAROJN!!! Eĉ de nula komencanto, traleginta libron 5-foje (pli bone – ĝis-10-foje!) eĉ sen vortaro komprenos multon, komprenos, pri kio temas kaj kion faras la herooj de la koncerna verkaĵo. Ju pli da libroj oni tiamaniere tralegos, des pli rapide oni progresos. Aldone estas tre dezirinde aŭskulti diversajn radio-elsendojn en E-o (ekzemple en la paĝaro *www.radioarkivo.com*), kantojn, partopreni en iuj ne-krokodilaj E-aranĝoj. Post tralego de kelkaj libroj dezirindus eklegi iun lernolibron aŭ viziti elementan kurson. Sed legadon (kaj aŭskultadon) oni devas daŭrigi. Unu el la grandaj avantaĝoj de tiu metodo estas la fakto, ke la lernanto ne devas parkerigi centojn kaj milojn da vortoj. Mirinde, sed post iom da persisto en legado vortoj kaj esprimoj kvazaŭ mem facile enkapiĝas. Kaj ilia signifo fariĝas komprenebla sen uzo de vortaro! Bedaŭrinde, tiu metodo ne ebligas 100-procentan komprenon de uzata teksto, do iom pli poste vi povas por traduko de apartaj malofte uzataj vortoj konsulti vortaron. Sed NUR NE EN LA KOMENCO! Tio estas strikte malpermesita! Sed kial mi skribis, ke tiu metodo estas malfacila? Ĉar multaj homoj erare pensas, ke ili jam ĉion scias pri metodoj de lernado de fremdaj lingvoj kaj preferas agi nur tiel, kiel oni faras tion plej ofte en multaj lernejoj: lernolibroj, lecionoj, vortaroj kaj nepra kaj pena parkerigado de novaj vortoj (aŭ radikoj). Mi ie legis, ke 99 homoj el 100 uzantaj similan metodon, neniam sukcesas ellerni lingvon. Terura statistiko! Sed mi iom devojiĝis. La malfacileco de tiu metodo estas en tio, ke homoj ne kredas, ke tiamaniere oni povas rapide ellerni la lingvon. Multaj asertas proksimume la jenon: „Tiu metodo ne estas uzebla, ĉar mi neniam komprenos la sencon de la vortoj, eĉ se mi centfoje tralegos iun libron". Sed provi kaj konvinkiĝi pri la malo ili ne deziras... Aliaj asertas, ke ili mem scias, kiel oni povas lerni lingvojn kaj por tio ĉiam nepre estas bezonataj lernolibroj kaj vortaroj. Kaj nur poste (eble post jaroj), kiam ili jam parkerigos milojn da vortoj, oni devos komenci legadon.

Bonan libron pri simila metodo verkis hungara tradukistino Kató LOMB, kiu diversgrade posedis 16 lingvojn. La libro nomiĝas „Kiel mi lernas lingvojn". Estas interese scii, al kiom da lingvoj ĝi estis tradukita? Ĉu iu el la legantoj povas informi min pri iuj nacilingvaj tradukoj?
Ĉu iu uzas tiun metodon (aŭ similan al ĝi)?

Aleksandr GRIŜĈENKO, Ukrainio, <agri@lep.lg.ua>
(aperis en la dissendolisto „e-ins", 26.07.2006)

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Mireille Grosjean (Prezidanto); Boris Grigorjevîč Kolker (Vicprezidanto), Reza Torabi (Sekretario), Julián Hernández Angulo, Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze, Mónika Molnár

Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute

Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman

Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

Regulara: Marija Beloševîč, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas

Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*

E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*): faka sekcio de **TEJO** (poŝtadreso ĉe UEA).

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*

TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker** (*http://www.tejo.org/*).

UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI**: François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88*, *mireille.grosjean@rpn.ch*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*.

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA*, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*

Redaktejo: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*. Rete: *<jozefonemeth@yahoo.com>*, *http://www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-89) 356-050.* La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK*, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, *<r.moerbeek@wanadoo.nl>*.

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

Benino*:* François Hounsounou, BP 226, BJ-Lokossa-Mono, *hounfranc@yahoo.fr*

Brazilo: *vakas geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Ĉinio: *vakas*

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy, E-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *hamzeh@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *pmarti10@xtec.cat*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iesperanto@versatel.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Gjerdeveien 157, NO-4028 Stavanger, *akbondhus@c2i.net*

Pollando: Piotr Nosek, ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042 Kraków, *piotr.esp@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, *siv.burell@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets, *mireille.grosjean@rpn.ch*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T.I.E.To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti 32-108, UA-43026 Luck-26, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj **Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh77@gmail.com*

Venezuelo: *vakas*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Portugalio: *vakas*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*